Ankaŭ niaj lojalaj kunlaborantoj katalunaj por pure zamenhofa laboro esperanta sin turnu al siaj samregionanoj per tre grava dokumento elpruvanta tute klare kiamaniere eble senkonscie erarigas la membrojn de H. E. A. tiuj, kiuj volas vidigi altiron de grandnombra kataluna esperantistaro de H. E. A. per renverso de ĉi tiu Asocio kaj statigo de alia nova organizaĵo; sed mi ne volas komentarioj, mi lasas plenlibere la konkludojn al la samideanaro, nur mi konstatas ke mia esperanta traduko de la katalunlingva cirkulero estas tute fidela je la kataluna teksto. Jen ĝi:

AL LA MEMBROJ KAJ GRUPOJ ALIĜINTAJ AL LA KATALUN-BALEARA ESPERANTISTA FEDERACIO:

AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ;

Amikoj: Per tiu ĉi komunikaĵo ni havas la honoron informi vin, ke ni forlasis niajn postenojn de Prezidanto, Kalkulisto kaj Voĉdonanto de la Komitato de K. E. F. kaj Direktoro kaj Fedaktoro de «Kataluna Esperantisto» respektive, ĉar iuj elementoj, kiuj ĉiam karakteriziĝis per sia influo al la K. E. F. laŭ ia politika tendenco, estas metintaj al ni serion da malhelpoj al nia senpartia kaj rekonstrua laboro, kaj ne nur faris ili konsantan, sisteman kaj nerespekteman opozicion, sed ili eĉ kuraĝis nei la virtualecon de la *interna ideo* de Esperanto, deklarante, ke ili estas esperantistoj por servi sian idearon politikan.

Ni opinias, ke en ĝenerala karaktera organizaĵo, kiel la K. E. F., konsistanta el elementoj de ĉia tendenco politika, religia kaj sociala, oni devas agi kun la maksimume ebla neŭtraleco, sen iaj partieceoj. Ĉar ili celas servi sian politikan idearon, *ke ili estu sinceraj kaj fondu esperantistan societon je sia tendenco*, simile al S. A. T., al I. K. U. E. kaj aliaj asocioj, kaj eble ne mankos

al ili valora kunhelpo. Sed ĉar ili preferas agadi laŭ nereкта formo, kiun ili ĉiam uzis, tio kaŭzis interne de la Komitato neutilajn kaj longegajn diskutadojn, kiuj malebligis la interkonsenton, kaj ni preferis protesti kontraŭ tiu agado konstante tendencema kaj forlasi niajn postenojn, tial ke anstataŭ senutile diskutadi, ni preferas profiti la tempon propagandante Esperanton, kiel ni faris antaŭ ol ili eniris en la Komitaton.

Amikoj: vi, kiuj, dum la Diktatoreco, vidis, kiel la K. E. F. suferis persekuton kaj punon, *pro politikaj motivoj*; vi, kiuj vidis, kiel ili forlasis la K. E. F. en Vinaroz, *pro politikaj motivoj*; vi, kiuj vidis, kiel *tuj post la ŝanĝo de la politikaj cirkonstancoj en la lando*, ili redaŭrigis la interrompitan agadon; vi, kiuj vidis la manieron nenoblan, netolereman kaj hontan, kiel estis kontraŭbatalata la K. E. F. - Komitato, kiu konsistis el dignegaj personoj, la tagon de la lasta Ĝenerala Kunveno de K. E. F.; vi, kiuj vidis, ke dum malplena deko da monatoj de agado, malgraŭ ilia opozicio, ni rekonstruis la K. E. F. reorganizitan kaj starigis por ĝi taŭgan ejon; ke ni reaperigis «Katalunan Esperantiston», ke ni starigis ĉiutagan informan Esperantistan oficejon, ke ni organizis propagandajn ekskursojn kaj kurson de Esperanto per korespondado; ke ni okazigis Kongreson de Esperanto en Barcelono, pri kies kontentiga rezulto estas bela pruvo la lasta numero de «Kataluna Esperantisto» (Majo 1930), k. t. p., k. t. p., kaj ke, se ni ne faris pli aŭ pli bone, estas pro tio, ke ni ne povis aŭ ne sciis; vi, ni ripetas, juĝos pri unuj kaj aliaj.

Ni ne neas, ĉu ili propagandis aŭ propagandas Esperanton, nek ni kontraŭbatalas la politikon. Tio, kion ni diras estas, *ke ni ne akceptas, ke en la K. E. F., kiel Esperantista organizaĵo, oni faru politikon*, kaj des malpli nacieman politikon, ofte kontraŭa al la fratica sento, kiun reflektas la *interna ideo*. Kaj pro tio estis farata al ni tiu sistema opozicio, kiu devigis nin forlasi la postenojn, tial ke ni ne volas perdi tempon, nek sekvi difinitan vojon politikan, tendencan kaj eĉ kontraŭan al la esperantista idealo, ĉar tio endanĝerigas nian movadon.

Ni eksigas el la Komitato kaj lasas al ili la kampon libera, por ke, *pli malpli kaŝe* ili daŭrigu la politikon, kiun ili ĉiam faris. Ni, *kiel esperantistoj*, kaj estu akcentate, *kiel esperantistoj*,

en aŭ ekster la K. E. F., kredas, ke oni nur devas fari Esperantismon. Kaj Esperantismon ni faris nur, ne altirante al ni, kiel ili, la malsimpation de la registaroj, kiam Esperanto bezonas tiom la oficialan, kiom la privatan helpon.

Pro respekto al nia idealo ni citas nenies nomon kaj, dum ni povos, ni evitos la personalismojn. Ni limiĝas je la klarigado pri la motivoj, kial ni estas forlasintaj la postenojn en la Komitato, kien kondukis nin la konfido, kiun je ni vi havis. Sisteme ili rifuzas la laboron, en kiu multaj el vi kunhelpis, kiel tiu de la lasta Kongreso. Sed ne gravas. Tiel vi konos ilin pli bone.

Laboru ni por la realigo de la spirito entenata en nia himno «*La Espero*». En ĝi ni vidas la grandiozecon de la verko de D-ro Zamenhof, nia majstro. Pro ĝi ni agadas kun konstanto kaj fervoro, sen iaj malfortigoj. Ni estas certaj, ke ankaŭ vi metas vian volon al la servo de la *interna ideo*, pura neŭtrala, sen danĝeraj politikaj miksaĵoj.

Amikoj esperantistaj: Nia idealo estas frateco kaj neniel naciaj aŭ rasaj malamoj. Nun kaj ĉiam, antaŭen por Esperanto! rezignante, kiam estas konvene je la kaŭzantoj de tiuj internaj bataloj, nuligindaj por la bono de Esperanto.

En Junio, 1930.

Anĝelo Valdepeñas, Prezidanto.

Johano Campdelacreu, Kalkulisto.

Jozefo Anglada, Voĉdonanto-delegito de la «Enciklopedia Akademio Espero» kaj Direktoro de «Kataluna Esperantisto».

Francisko Vilá, Voĉdonanto-delegito de la grupo «Esperanta Juneco».

Francisko Gorgues, Redaktoro de «Kataluna Esperantisto».

Noto: Ni havas la intencon fondi societon kaj eldoni, kiel eble plej baldaŭ gazeton de Esperantista propagando kaj ĝenerala kulturo, kiu estosdefendanto de nia idealo kaj kreanto de novaj adeptoj. Estas, do, necese, ke ĉiuj esperantistoj, kiuj akordiĝas kun nia agmaniero, sendu al ni, tiel baldaŭ, kiel eble, sian nomon kaj adreson. La grupoj estas petataj sendi al ni liston de nomoj kaj adresoj de la membroj kaj simpatiantoj kiuj volas kuraĝigi nin en tiu ĉi agado neŭtrala kaj Zamenhova.

Skribu al la adreso: *Esperanto*—Mensajeros, Carmen, 3,

buzón núm. 7, BARCELONA. Sendu vian aliĝon per poŝtkarto, laŭ la jena formulo aŭ simila: «La subskribinto (nomo) , loĝanto en la urbo , strato num. , konsentas kun la sintenado de Anĝelo Valdepeñas kaj aliaj subskribintoj, rilate al la K. E. F., esprimita en cirkulero de Junio 1930, ĉar li opinias, ke la esperantista agmaniero devas esti pure senpartia kaj Zamenhofa, kaj li kuraĝigas ilin daŭrigi la entreprenitan taskon.

Dato

Sed, kara leganto, atentu bone, ke tiuj katalunaj samideanoj, kies konduto naskis la antaŭan cirkuleron, estis naskintaj kaj propogandintaj la Konfederacion, kaj kiam oni invitis ilin al la Kongreso de Bilbao, por starigi la Konfederacion, per oficiala skribaĵo, ili rifuzis ĝin fondi kaj aliĝi al ĝi «*ĉar ili estis atingintaj aperi KIEL NACIO en la Internacia Movado*». Kaj mi, poŝt kelkaj jaroj de laboro kontraŭ tia konduto interne de nia neŭtrala tutmonda organizaĵo, ĉiam argumentante ke nia organizaĵo tutmonda, la regularoj de la Kongresoj, k. t. p., malpermesas ĉian politikan, socian kaj religian celon, atingis je la Kongreso de Antverpeno, ke kataluna Esperantista Federacio, tiam jam sub la decido de Registara Aŭtoritatoj aludita de la antaŭa cirkulero, ne estu konsiderata NACIA SOCIETO, ĉar ĝin konsideri tia estas kontraŭ niaj regularoj, tial ke la konsidero estas politika afero. Kaj mi rimarkigas ĉi tie, ke nia kunheano S-ro Andrés Piñó iam per letero sin turnis al mi pri tiuj fiesperantistoj (esperantistoj por utiligi esperanton al politika tendenco pri sendependado aŭ apartiĝo de la kataluna regiono el la cetero de Hispanujo) dirante, ke ni devas ne atenti ilin; sed S-ro. Andrés Piñó, kiu ĵus ekŝiĝis de sia posteno de regiona Voĉdonanto de nia Asocio, ĉar li estas partiano de S-ro Maynar, en la ĵus pasinta Kongreso de Oxford, en kunveno de la reprezentantoj de la tutmonda esperanto-organizaĵo parolis favore al tiuj esperantistaj politikemuloj katalunaj, sed kompreneble li malsukcesis, ĉar la Sekretario de la *Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj* (K. R.), S-ro Frans Schoof, energie kontraŭdiris la pretendon de S-ro Piñó; kaj same rimarkinde estas aliaj du faktoj: unua, ke je la fino de la pledo ĉi tiun partoprenis la RAJTIGITA REPRESENTANTO de

nia NACIA ASOCIO, S-ro Rómulo S-Rocamora, el Barcelono, kontraŭ la pretendo per klarigoj pri K. E. F. al S-roj Schoofs kaj Piñó; dua, kian reprezentantecon havis en tiu kunveno nia kunheano S-ro. Piñó? Ĉu oficialan? S-ro. Piñó, pro pago de 100 svisaj frankoj al Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado estas kvazaŭ honora membro de tiu komitato, kaj tial ke mi estis aukaŭ tia de la Kongreso de Genève (1925. Je kiu dato oni fondis tian membrecon por havigi monon al la 1. C. K.) dum du-tri jaroj, mi bone scias kian rajton donas la pago de tiu kotizo. Vidu la Jarlibron de U. E. A. de ĉi jaro, paĝoj 16, 17, por konscii ĉu S-ro Piñó rajtis oficiale tion, kion li faris, des pli apartenante al H. E. A., ĉar lia entrepreno estis tute kontraŭ H. E. A. Kaj mi rimarkigas ĉion antaŭan por montri tute klare la agadon kaj konduton de la partianoj de S-ro Maynar kaj ke la lojalaj membroj de H. E. A. konkludu pri tiaj agado kaj konduto juĝante kaj kvalifikante ilin.

Dume tiel agas kaj sin kondutas iuj heaanoj, ni trafas per la efika laboro de nia Direktanta Komitato novan firman paŝon en la Ministerio de publika Instruado, kiel vidigos la tradukon de la dokumento al H. E. A.:

Univesitatoj. Je ĉi tiu dato la Ministro transdonas al mi la jenan Reĝan Decidon:

Klera Moŝto: Per dokumentaro prezentita de la Hispana Esperanto-Asocio, ĉi tiu petas ke la idiomo esperanto havu samajn rajtojn, kiajn havas la ceteraj modernaj idiomoj kaj ke ĝi estu metata en la sama vico apud la cititaj idiomoj ĉe la abiturienta studado universitata;

La konstanta Komisio de la Konsilantaro de Publika Instruado donis la jenan informon:

Pristudita la peticio de l' S-ro Vicprezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio petanta decidi por la internacia helpa lingvo Esperanto samajn rajtojn kiajn oni donis al ĉiuj modernaj idiomoj kaj envicigi ĝin apud ĉi tiuj por la abiturienta studado universitata: Konsciante, ke tio, kion oni petas, estas la oficiala enkonduko de la instruado de esperanto laŭ samaj kondiĉoj je tiuj de la ceteraj naturaj modernaj idiomoj, konsciante la konvenecon aŭ malkonvenecon, oni konkludas ke la afero meritas meditado kaj detalan ekzamenon.

Konsciante, ke oni ne povas nei la valoron, kiun havas Esperanto kiel helpa lingvo, kaj la utilecon, kiun ĝi povas liveri je iuj okazoj al tiuj kiuj trafis ĝin paroli plene, kio sendube evidente estas pli facila ol lerni kiun ajn el la vivantaj idiomoj; sed precize ĝi ne povas havi rektan aplikon dum la abiturienta studado, kiu estas akademia ciklo sen utiliga celo tuja por la intelekta formado de la junularo, nur kun la ekŝkluziva celo eduki la lernanton por kio la instruoj, kiuj ĉefe devas karakterizi la ciklon, estas tiuj kiuj agas sur lian spiriton kaj en ĉi tiu lasu profundan kulturan restaĵon, kaj de ĉi vidpunkto esperanto ankoraŭ ne estas konsiderinda.

Konsciante ke krom ĉio dirita kaj konsciita la utileco de la helpa lingvo, Konvenas nediskuteble ke la ŝtato helpu la laboron de la esperantistaj Ligoj kaj la disvastigon de Esperanto, sed ne per la Institutoj de dua instruado kaj jes per la instruoj, kiuj celas la konkretan preparadon por tujaj celoj kaj aplikoj;

Ĉi Komisio opinias rituzi la peticion de la Vicprezidanto de la Hispana Esp-Asocio koncerne la enkondukon de Esperanto en la studoplanoj de la dua instruado, sed atenti bone la antaŭenpuson de l' Esperanto en alioj instruoj kaj eble ĝin enkonduki en la regularo por la instruplano de la Centra Lernejo pri Lingvoj se oni opinius ĝustatempe fari ĉe ĝi eksperimenton pri ĝia instruado.

Kaj konsentante kun la antaŭa informo, Lia Reĝa Moŝto decidis laŭ la informo mem proponas.

Tion mi Komunikas al vi por via kono kaj rezultoj.


Dio vin gardu dum multaj jaroj.

Madrido la 23^{an} de Julio de 1930.

LA SUBMINISTRO: GARCIA MORENTE

Kaj samtempe, spite de la ŝparema tendenco de la nuna Registaro, pro kio la sumo destinita por subvencioj de la Ministerio de Publika Instruado estis rapide elĉerpita, dank' al vigla agado de nia Komitato, la Asocio trafis 1.000 pesetojn.

Fine, je la proksima oktobro la membroj de H. E. A. senpage ricevos la BES-Adresaron, kiu bedaŭrinde prokrastigis pro malfriĝo de presmaterialo por ĝin presi; kaj atentu bone,



Tombo en la kapelo de S. Victorian

ke ĉi tiu senpaga disdonado de la BES-Adresaro alportas nenian elspezon al la kaso de H. E. A., kvankam favore voĉdonis la akiron multaj membroj de H. E. A. kaj nur KVIN-SES voĉdonis kontraŭe.

Konsciu, do; kaj laŭ konscio, opiniu kaj agu.

Julio Mangada Rosenörn.

LA POEZIO DE HISPAN-ARABOJ KAJ ĜIA INFLUO
EN LA KRISTIAN-HISPANAN KAJ EN TIUJN
DE ALIAJ SUDAJ POPOLOJ
(DAŬRIGO)

La veziro *Hazm-Ibn-Jehvar* esprimis mirinde per belega versaĵo sian profundan korplendon por la dezerteco de la palaco de Kordobo; el la versaĵo jen fragmentoj hispana kaj esperanta:

Tus salas y desiertas galerías
mis ojos contemplaban,
y pregunté: ¿Dó están los que otros días
en tu seno moraban?
En mi seno, dijiste, breve ha sido,
muy breve su vivir.
Ya se ausentaron; pero ¿dónde han ido?
No lo puedo decir.

.....

Mi galeriojn, ĉambrojn, plendezertajn,
la cianj, mirrigardis;
demando jen: mi kie trovos spertajn
loĝintojn, kiuj ardis?
Ĉe mi mallonga estis ja-ci diris-
restado la ilia.
Forestas ili, jes; sed kien iris?
Respondo; vel, nenia.

Dum la regado de *Abderrahmen I^a*, fanatika partiano de la princo *Hixem*, la princo *Suleiman* eltirigis la okulojn al poeto

Abulmayxi, ĉar ĉi tiu verkis versaĵon per kiu li aludis *Hixem'n*, kaj la fanatikulo konsideris la aludojn ofendantaj, jen la mirinda kortuŝanta versaĵo hispane tradukita de Valera kaj la esperanta traduko.

La madre de mis hijos abrumada
por el dolor está
porque mis ojos con su diestra airada
ha fulminado Alá.
Ciego me ve seĝuir la esposa mía
esta mortal carrera,
hasta que al borde de la tumba fría
con el báculo hiera.
Y la infeliz postrada por el suelo
exclama: «¡Oh, suerte! ¡Oh, suerte!
¡No aumentarás tan espantoso duelo
ni con la misma muerte!»
Y abre en mi corazón profunda llaga
diciendo: «No hay pesar
como no ver la luz, que ya se apaga
en tu dulce mirar.»

.....

Jen patrino de miaj filoj vundata
de dolorego ja
ĉar okulojn miajn, man' ĉagrenata
ĵus tiris. Ve, Ala!
Min edzino vidas sekvi la vojon
tutblinde jam, la mian,
ve! ĝis kiam mi do falos, mortfojon,
en tombon tre glacian.
Kaj ŝi, genuiĝante sur pavimon,
ekkrias: «Ho, ve sorto,
al mia la doloro ne la limon
alportos eĉ la mortoj»
Jen korvundo mia kiam ŝi diras:
«Senlumo de l' rigard'
cia, iam dolĉa, koron disŝiras.
Kruelo de l' hazard'!»

Kaj sin sentante morti la reĝo kaj poeto *Al-Motamid*, kaj perdinte la esperon eliri el la malliberejo de *Agmat*, verkis belan versaĵon kiu estas vere klasika romanco, el kiu jen hispana kaj esperanta fragmentoj:

Con mi vida el infortunio
se ha ligado para siempre.
¡Oh, palacio de *Az-Zahi*!
¡Oh, fastuosos banquetes!
¡Cuando en mi mesa solían
tomar asiento los Reyes!...
Así el placer y el dolor,
así los males y bienes,
la tela de nuestra vida
con varios colores tejen,
hasta que corta la tela
y la esperanza la Muerte.

.....

Malbonsort' kun mia vivo
kunligiĝis jam por ĉiam
Ho, palac' de *Az-Zahi*!
Ho, festenoj ambroziaj!
Kiujn partoprenis Reĝoj
iam ĉe l' manĝtablo mia!...
Tiél ĝojo kaj doloro,
bono kaj la malo, ĉiaj,
teksas tolon de la vivo
kun koloroj tre variaj,
ĝis fatale tondas tolon
kaj esperon Morto iam!

(*Daŭrigota.*)

RECENZEJO

«*Esperanto kaj Kulturo*» de D-ro Robert Trögel, tradukita esperanten de J. Schröper, 37 paĝa, 21 cm. x 15 cm., eldonita de Heroldo de Esperanto. Prezo: RM 0,80.

Mi ne povas akordiĝi kun la tradukinto pri lia ĵantaŭparola laŭdo al ĉi tiu verko, kiam li troigeme per la unuaj alineoj asertas ĝiajn unuarangecon inter la priesperantaj verkoj, «abundan pensriĉecon, sentruan logikecon, lertecon kaj spertecon rilate al la bataltaktiko». Ĉi verko *nenion novan* povas lernigi al ni pri bataltaktiko; ne pro tio ke ni estas majstroj (?) tiurilate—majstreco ja senĉese evoluadas kaj progresadas—, sed ĝuste tial ke al ĝi mankas originaleco: ĉiujn ĝiajn argumentojn ni jam delonge konas, ili ja esence estas enradikiĝintaj en iu ajn meznivela esperantisto, kies esprimpovo kaj klareco eble—eĉ ofte—malsuperas tiun de D-ro Trögel, sed ne ties kernon, kiun la meznivelulo certe proksimume egalvaloras. Ĉi tiu broŝuro adresita al la «kleruloj inter la malestimantoj» de Esperanto, kvankam entenante estimindajn prilivelojn, ne estas la plej trafa argumentaro por konvinki tiujn, kiuj,—laŭ «*oficiala kapo*»=ortodoksa scienco—nepre devas restadi kun stultete premfermitaj oreloj antaŭ faktoj. Niaj sciencistoj elserĉu aliecajn argumentojn: vere originalajn.

La duan ĉapitron «*Esperanto kaj la germana popoleco*» mi opinias la malplej trafa pro nebuleco, malklaro: Tie tekstas komplikaj, ne bone kompreneblaj paragrafoj..., kaj «sentrua logikeco» ja vere postulas klarecon for de nebulo. Krom kelkaj en la unua ĉapitro enhavataj konsideroj pri gramatiko kaj vivopovo de Esperanto, la plej trafa bona parto estas la tria ĉapitro «*Esperanto kaj la evoluo de la homaro*». Mi tamen ripetu: malestas fortika originaleco en ĝi.

Estas trovebla la vorto «*rekono*» en la senco de «*agnosko*». Tio estas naciismo nepre evitinda-enda, kiun Esperanto superis per tiu vorto «*agnosko*», jam sufiĉe vaste akceptita. Nia lingvo pli kaj pli plipreciziĝu; ne samas «*rekoni*» kiel «*agnoski*». Jen ekzemploj: «kvankam ne vidinte lin jam delonge, mi facile tuj rekonis lin» (re-konis) «Nek Hindujo, nek Egiptujo, volas agnoski superregon de Anglujo.»

«*Akcidencaj*» anstataŭ la kutima «*akcidentaj*».

La tradukinto misuzas la vorton «afikso», ĉar li diras «afiksoj kaj sufiksoj», kie devas teksti «prefiksoj kaj sufiksoj».

Oni atentu pri naciismema malamiko en ĉiu el ni sin kaŝanta. En paĝo 26^a—linioj 7-8 de malsupre—oni trovas «eldevigis», kiu certe al ne germanlingvaj sonas strange kaj ne estas tuj komprenebla. Tio ne estas pardoninda. Oni respektu nian lingvon, kaj ne enkonduku aglutinkutimojn el la germana. Ni memoru pri tiu arĥaika «elrigardi», malbeninda kunmetaĵaĉo (pura germanismo) de la infanaĝa Esperanto. Jam ĝi ne estas tia, sed «aspekti». Tiu «elrigardi» sukcesis «rompi la kapon» al pli ol unu—ankaŭ al mi—kaj nur la kunteksto nin savis. Ne estan riproĉo al germanoj! Mi tiel kondukas rilate malzorgajn hispanojn facilanimajn, kiuj, ekzemple, emas konfuzi «ignori» kun «nescii» k. t. p.

Atenton pri neologismoj nenecesaj, kia «avanci».

Esperanto konciziĝas, do, ne la peza «civilizacio» sed «civilizo».

Ne «sub la vidpunkto» ĉar oni devas apliki ĝuste prepoziciojn; jes «de (laŭ) la vidpunkto».

Oni plejeble limigu uzadon de «je»; tiel, pli bone «koincidi kun» ol «koincidi je».

La stilo, ĝenerale bona. Oni rimarkas troajn «tiel same kiel». Kial ne uzi la belan novan formon «samkiel» por plivariigi iomete?

La presvestaĵo de la verko, senriproĉa; la kovrilo bela kaj serioza. L. M. S.

«*Al Torento*», novelo originale en Esperanto, de Stellan Engholm, 93 paĝa, 20x13 cm., eldonita de Heroldo de Esperanto. Prezo. RM 1'50.

Ĝi preskaŭ nur limiĝas je amateco, elreliefiĝanta el sociala fono ne tre interesa. Skeptikeco superregas la verkon. Ŝtonpezeco de la malprogresita forto de la socio—tradicio, antaŭjuĝo—premegas la protagonistojn, ĝis kiam la ĉefrolulo—malpli liberspirita ol la amatino, antaŭe animŝirita de falsa «al-Nov-emulo»—decidiĝas solvi la problemon laŭ la sole saĝa maniero: ignorante la sociajn konvenciojn, li akceptas sin kiel sian virimon. Ŝia infano ne plu estas baro, ĝi simboliĝas la estontecon.

La malbona fiaĉa flanko de la socio jam tro multe estas pritraktita de la verkistoj. En ĉi tiu *transir-epoko* oni pli sociale kuraĝe pritraktu estontecon, Novon, nepre konstruenda laŭ tute alieca justa plano.

Bele fluadas la lingvaĵo, kiu plezurigas nin per sia facila moviĝo.

Mi rimarkis la formon «tiam kaj tiam» anstataŭ la foriginda naciismo «de tempo al tempo», kiu krome tute mallogikas, ĉar ĝia senco logika kontraŭas ĝian uzosignifon. Ni, do, uzadu «tiam kaj tiam», kiun esperantistoj-avangarduloj ŝanĝos en eĉ pli bonan «tiam kaj aliam».

La peza «tiamaniere» tro ĉeestas. Oni pli ofte uzadu «tiel» kaj substrekitan «tiele».

Vorto «suspiro», eble enkondukinda por disigi la oblsignifon de «sopiro».

«Porcio da ferŝtono» estas erara, ĉar «porcio» rilatas kvanton da manĝaĵo; do, «peco da ferŝtono».

En paĝo 24^a, meze, estas uzata «demandi» en senco «peti», kio ja estas erara. Ni ne imitu tian eraron, en kiun enfalas ofte francoj.

Kiel unu el multaj pruvoj pri la kapablo de Esperanto riĉe vortigi unu ideon laŭ diversaj formoj, estas trovebla la vorto «ĉiesulino», kiu eĉ povas fariĝi «ĉiesino», samkiel anstataŭ «prostituulino» oni diras «prostituino'n».

«La formo «onies» estas erara; anstataŭe, «onia». Mi profitas la okazon por publike bedaŭri la maloftecon de la tute laŭfundamentaj «onia», «oniu», kiujn *nur* la servuteco al naciilingvoj maloftigas en nia uzado. Estas necese, *energie*, reliefigi ĉiajn karakterizajn trajtojn de Esperanto, ne timante forigi de la sklaviga kampo de la hejmlandaj lingvoj. El la vivsukoj mem de Esperanto oni povas fabrikii plej delikatan trinkaĵon. Tiuj formoj similaj al «finfine» estas uzindaj. Oni trovas la formon «samsame».

En paĝo 46^a, 13^a linio, mistroviĝas «ilia» anstataŭ «sia».

El presa vidpunkto ĝi estas bela verko. L. M. S.

«*En Okcidento nenio nova*» de Erich Maria Remarque, el germana lingvo tradukita de kvar (Heroldo de Esperanto).


Ĉi tiu verko, jam tradukita en tiom multe da lingvoj, estis

tradukenda esperanten; tial ni ĝojas havi ĝin en nia lingvo. al ĝi tiome adekvata. Ĝi restados por ĉiam, kiel unu el la plej majstraj priskriboj de la Granda Milito, malgraŭ multaj tiaspecaj verkoj aperintaj, eĉ aperontaj. Guste pro la tiel nomata «interna ideo» ni ne povus—sen honto—malhavi en nia literaturo tian gravan verkon. Estas bedaŭrinde, ke oni tre rapide mis ĝin elgermanigi, por aperigi sian esperantan editon ekzakte dum la Esperanta Libro-Festo. Tiu rapidemo ne permesis al la «Kvaro» finpoluri la tradukon al la Majstro, eĉ estus estinta pli granda honorigo ol akurata aperigo en tiu memortago, iomete prokrastita publikigo, cele plizorgi la tradukon. Estas rimarkeble ke—malgraŭ la *kvarco* de la tradukintaro—la stilo estas treete unuecigita.

Jen, mia persona opinio tamen pli ŝatus unu solan tradukinton, ĝuste tiun, kiu esperantigis la paĝojn 52-53: tiun al la tero dankokanton plenan je emocio pro priskriba kolorforto. Spite de tiu «kvarco», belaĵoj oftestas ĉiujn partojn de la novelo, kies stilo ĝenerale fluas, belas. Sed... mi devas sed-igi. Kvankam mi kompreneble konsentas pri malfacilo trudi verkon, kia estas ĉi tiu, mi devas plendi kontraŭ troa facilanimeco de la «kvaro» enkonduki novajn vortojn. Jen, eĉ en «Plena Vortaro» ĵus publikigita de SAT, estas netroveblaj, ekz., la vortoj: *splini*, *skato*, *pufro*, *piero*, *damni*, *gulaŝo*, *paniklo*, *staplo*, *rame*; *stumbli*, *kviki*, *jnfto*, *noralo*, *ĵatelo*: 14 radikoj ĵeture! La teruro de la Majstro antaŭ la dikaj vortaroj de la nacilingvoj... Se ĉiu eventuala trodukonto en esperanton tiom kuraĝe enkondukus aliajn 14 radikojn po libro.... Ties signifojn oni ne sciigas al ni ĉe la fina listo da klarigoj iom longa (62), sendube por ne plidikigi ĝin ankoraŭ.

Jen pliaj, kies neceso al mi ne evidentiĝis, ĉar la apudaj interparentezaj eble sufiĉas: *jubili* (ĝoji), *bruske* (abrupte), *masakri* (amasbuĉi), *graci* (gracia), *fascini* (ravi), *avanci* (antaŭeniri, antaŭenigi), *eskapi* (sin savi, saviĝi), kaj atentu ke ĉiuj estas, kiel aliaj multaj novaj enkondukitaj vortoj (bedaŭrinde) preskaŭ absolute hispanaj (*jubileo*, *brusca*, *gracil*, *fascinar*, *avanzar*, *escapar*).

Fugi anstataŭ *fuĝi* (ĉar *fugo* estas muzika radiko) el SAT-Vortaro. Pri ĉi tiu vorto ankoraŭ ne unuformiĝis la lingva uzado.



Tombaro de la Aragonaj Regoj. (S. Juan de la Peña)

IMP. «EL FINANCIERO», IBIZA, 13. — MADRID